***

Je memoro de Witold Waroczewski

Steh auf !
Verfluchten Polen !
kriis, lia dentkarno,
kiel tiu de hundo montranta dentojn
elblankighis.
Tiu ech ne ekmovis,
sur liaj piedoj la soldatshuo trua,
el lia kaptitvestajho elpendas la fadeno,
super lia koro eta Patrujo:
en triangulo turnita malsupren la P.
Char la cerealaj kampoj,
kaj la salikoarboj apud la rivereto jam liberlasis lin.
Nur akraj randoj
de l' frostitaj terbuloj restis,
kaj la koto,
kiam chesis la vintraj malvarmoj.
la 15-an de junio en 1942,
supozeble en varma antausomera tago
kiam
en grupoj floris la margareto…….

Tradukita de János Ruff